XVII ORDINARA TEMPO – 25a de julio 2010

PETU, KAJ AL VI ESTOS DONITE – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 11,1-13

Jesuo preĝis en iu loko; kiam li ĉesis preĝi, unu el liaj disĉiploj diris al li: « Sinjoro, instruu nin preĝi, kiel ankaŭ Johano instruis siajn disĉiplojn». Kaj li diris al ili: «Kiam vi preĝas, diru:

"Patro, estu sanktigata via nomo, venu via regno; donu al ni ĉiutage nian panon ĉiutagan, kaj pardonu al ni niajn pekojn, ĉar ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj, kaj ne lasu nin en tento" ».

Poste li diris al ili: « Se iu el vi havas amikon kaj noktomeze iras al li, kaj diras al li: "'Amiko, pruntedonu al mi tri panojn, ĉar amiko mia venis al mi post vojaĝo kaj mi havas nenion por proponi al li", kaj se tiu de interne respondas al li: "Ne ĝenu min, la pordo jam estas fermita, mi kaj miaj infanoj estas en la lito, mi ne povas leviĝi por doni al vi la panojn'' , mi diras al vi ke, ankaŭ se li ne leviĝos por ilin doni al li, ĉar li estas lia amiko, almenaŭ pro lia sintrudemo li leviĝos por doni al li kiom li bezonas"

Nu, mi diras al vi: petu, kaj estos donite al vi, serĉu kaj vi trovos, frapu kaj al vi estos malfermite. Ĉar ĉiu petanto ricevas, kaj la serĉanto trovas, kaj al la frapanto estos malfermite.

Kiu patro inter vi, se la filo petas de li fiŝon, donos al li serpenton anstataŭ fiŝon? Aŭ se li petas de li ovon, donos al li skorpion? Se vi do, kiuj estas malbonaj, scias doni al viaj infanoj bonajn aĵojn, des pli via Patro ĉiela donos la Sanktan Spiriton al tiuj, kiuj ĝin petas de li! ».

La Patro Nia alvenis al ni en tri versioj, tiu de Mateo, tiu de Luko kaj unu en la unua katekismo de la eklezio, nomata Didaché, tio estas instruado.

Probable – kaj nun ni tion vidos – tiu de la Evangelio de Luko estas la plej malnova, ĉar estis karakterizo de la verkistoj ke oni aldonas al la vortoj, al la instruado de Jesuo, sed neniam ke oni forprenas. Kaj tiu de Luko, kiel ni vidos, estas la plej mallonga. Eble do, ni havas ĉi tie la originan preĝon instruitan de Jesuo.

Kia estas la kunteksto? Jesuo estas en iu loko por preĝi. La evangeliisto Luko estas tiu kiu, pli ol la aliaj, prezentas Jesuon preĝanta, sed neniam en sinagogo aŭ en templo. Kiam Jesuo iras en la templon aŭ en la sinagogon, li iras por instrui, kaj lia instruado signifas liberigi la personojn de la religia doktrino kiu estis al ili altrudata, por ilin malfermi al la amo de la Patro.

Por ili transirigi de la obeo je la leĝo,al la akcepto de lia amo.

Nu, la disĉiploj ne petas de Jesuo, ke li instruu preĝi kiel li preĝas, kaj ili eĉ ne preĝas kun li, sed ili volas preĝon samkiel tiun kiun Johano Baptisto instruis al siaj disĉiploj, kiu ilin distingu disde la aliaj.

Do Jesuo ne donas regulojn, ne donas formulojn, nek horarojn, sed vivostilon. Ni ĝin vidu.

Antaŭ ĉio, por sin turni al Dio, oni ne sin turnas en religia maniero, per ĉiuj tiuj titoloj, tiuj altsonaj terminoj “Plej Alta, Elstara, ktp”, sed en la komunumo de la sekvantoj de Jesuo oni sin turnas al Dio lin vokante ‘Patro’.

Dio ne volas incensantajn pastrojn, li ne volas devotulojn, sed volas filojn. Patro, en la tiuepoka kulturo, estas tiu kiu transdonas al sia filo sian tutan vivon, sian tutan ekziston. Do oni rekonas en Dio la vivofonton, kaj tial oni sin turnas al li vokante lin ‘Patro’.

Kaj la unua peto estas “Estu sanktigata via nomo”. La verbo “sanktigi” signifas konsekri, tio estas rekoni la valoron de io. La komunumo, do, en la preĝo kiun Jesuo instruas, diras “estu rekonata via nomo”. Nome Dio devas esti rekonata kiel Patro, kaj la Patro kiun Jesuo prezentis estas la Patro kies amo ne distingas inter bonuloj kaj malbonuloj, sed sin verŝas sur ĉiujn, la Patro kiu ne rigardas la meritojn de la personoj, sed rigardas la bezonojn.

Do Jesuo invitas la komunumon peti “tiu estu la nomo per kiu vi devas esti rekonata, tio estas, Patro”, ne la Dio kiu premias, kiu punas, la Dio timenda, sed Patro, kies amo estas senkondiĉa.

Poste la peto ne estas tiom “*Venu via Regno*”, sed la verbo signifas “plivastiĝu ĉi tiu via regno”. Ekde kiam estas komunumo de disĉiploj kiu akceptis la beatecojn de Jesuo, la Dia Regno jam ĉeestas. Per “Dia Regno” oni kompreneble ne celas geografian areon, sed tiun kadron kie Dio regas la siajn, kaj Dio ne regas trudante leĝojn kiujn ili devas obei, sed Dio regas komunikante sian Spiriton, sian amkapablon mem.

Poste ni diris ke la Patro Nia estis al ni transdonita en tri versioj, nu ĉiuj tri versioj entenas iun grekan vorton kiu, en la greka, ne ekzistas, kaj ĝis nun oni ne konas ĝian signifon. “*Donu al ni nian panon*…” kaj sekvas termino kiun Jeronimo, la unua granda tradukisto de la Evangelio, tradukis en la Evangelio laŭ Mateo per la vorto “supersubstanca”, nome iu pano kiu estas trans la substanco, en la Evangelio laŭ Luko li ĝin tradukis per “ĉiutaga”, la pano de ĉiu tago, poste en la liturgia versio estis elektita la Evangelio

laŭ Mateo, sed oni anstataŭigis la “supersubstanca” per la pli facila “ĉiutaga”, kiu tamen kreas miskomprenon kvazaŭ oni devus peti de Dio la panon.

Kaj Jesuo tion diris klare “ne zorgu pri tio kion vi manĝos”. Do tiu pano kiu transiras la substancon, kiu ĝi estas? Ĝi estas la figuro de Jesuo, Jesuo estas la vivofonto de la komunumo, vivofonto kiel Vorto kaj kiel pano en la Eŭkaristio. Kaj poste la peto forigi tiujn kiuj estas la kulpoj kaj la pekoj de la homoj, tion motivante pro la fakto ke estas forigitaj ne la kulpoj de la aliaj rilate nin, sed forigitaj la ŝuldoj de la ŝuldantoj.

Ĉi tie temas efektive pri konkretaj ŝuldoj. Komunumo kiu ricevis kaj akceptis la mesaĝon de la Beatecoj ne povas konsisti el ŝuldantoj kaj kreditoroj, sed ĉiuj fratoj kiuj kundividas tion kion la unuj havas kun la aliaj. Do jen: la pruvo, la certeco ke kun Dio oni estas en ordo, ke Dio ĉeestas, estas ke en nia eno ne ekzistas ŝuldantoj kaj kreditoroj, sed ĉiuj fratoj.

Kaj fine la lasta peto, “ne lasu nin en tento”, laŭvorte “la provo”. Kiu estas tiu provo en kiu la komunumo petas ne esti forlasita? Estas la provo en kiun ĝi falis. Jesuo estis petinta de la disĉiploj, ilin konkukante al la Olivmonto, resti kun li, preĝi kun li por esti al li proksima por alfronti la momenton de la kapto kaj de la morto, kaj ili ĉiuj fiaskis.

Do la komunumo, konscia pri ĉio ĉi, petas ne esti forlasita en la momento de la provo kaj de la persekutado. Kaj poste la instruo de Jesuo daŭrigas invitante al plena fido en la Patra amo kaj, multobligante la verbojn trifoje – la “tri”signifas tio kio estas plena, definitiva – li diros “Petu, kaj estos donite, serĉu kaj vi trovos, frapu kaj al vi estos malfermite”.

Plena fido, do, en la Sinjoro, sed Jesuo diras ankaŭ kion oni devas peti, kion li certigas ke ĝi estos plenumita. “Se do vi kiuj estas malbonaj” malbonaj rilate la amon al la Patro, “scias doni bonaĵojn al viaji nfanoj, des pli via Patro ĉiela donos la Sanktan Spiriton al tiuj kiuj ĝin petas de li”.

Jen ĉi tie Jesuo sin devontigas, certigas, ke ĝi estos donita en la preĝo. Kio estas la Sankta Spirito? Ĝi estas la forto necesa por realigi la projekton de la Patro. Kiel ni jam diris, Dio ne regas la homojn eldonante leĝojn, sed komunikante sian Spiriton.

Do Jesuo certigas ke ĉi tiu peto de la Spirito, ĉi tio estos nepre plenumita. Ĉiuj aliaj jam estas plenumitaj ĉar la Patro, Patro bonkora rilate siajn infanojn, zorgas pri ili jam antaŭ ol ili tion petos de li.